2-a Jaro, N-o 40 (92) APERAS S.A.T. SEMAJNE I. Julio 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio) | Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

MIKAELO BAKUNIN

1814—1876

Estas nun 50 jaroj, de kiam la granda revoluciulo M. Bakunin mortis en Bern (Svisio). La 1. Julio 1876 fermiĝis por ĉiam la okuloj de homo, de kiu diris Herzen: "Lia distingiĝanta personeco, lia ekscentra kaj forta aplombo ĉie — en la rondo de la moskva junularo, en la aŭskultejo de la berlina universitato, inter la komunistoj ĉirkaŭ Weitling kaj inter la 'Montagnards' Caŭssidières, liaj paroladoj en Prag, lia gvidanteco en Dresden, la procedoj, la kondamno al morto, la malbontraktadoj en Aŭstrio, la transdonado al Rusio, kie li malaperis malantaŭ la teruraj muroj de Alexei-Ravelin — tio faras el li individuecon je kiu nek la tiamtempa mondo nek la historio povas preterpasi indiferente."

M. Bakunin naskiĝis la 8. Majo 1814 en la vilaĝo Premuchino, gubernio Tver (Rusio) kiel filo de nobela familio. Liaj gepatroj sendis lin en la artilerilernejon de Petrograd. Dum la jaro 1833 la 18 jara junulo fariĝis oficiro. La vivo kiel oficiro ĉe kartludado kaj drinkado ne plaĉis al Bakunin. En Wilna, kie li nun loĝis, li vidis la suferojn de la pola popolo, sub la rusa registaro, kaj tie li verŝajne lernis malami la despotismon kaj ami la suferantojn. Ne sen protesto de lia familio, li forlasis sian metion, kaj studis la germanajn filozofojn Kant kaj Fichte. 1836 Bakunin estis en Moskvo, de kie li skribis al sia fratino: "Mi ne havas alian celon ol esti homo, kaj ĉio kio malhelpas min je la marŝo al tiu celo mi disĵetos." Nun Bakunin komencis la studadon de Hegel, kaj estis precipe la konata frazo "ĉiu reala estas racia, kaj ĉiu racia estas reala", kiu faris la plej grandan impreson en la ribela animo. Bakunin deziris viziti Germanion. Li transloĝiĝis al Berlin kaj pli poste (1842) al Dresden, kie li skribis filozofiajn kaj politikajn atikolojn. Tiuj artikoloj estis la kokokrioj, kiuj vekigis la novan tagon de 1848. En Dresden la policistaro rimarkis, ke Bakunin ne amas "trankvilon kaj ordon", kaj Bakunin vojaĝis kun Herwegh al Zürich (Svisio), tie li konatiĝis kun Weitling kaj fariĝis socialisto. Post la vintro 1843/44 kiam li estis en Bern li iris al Paris.

Paris estis bolanta kaldrono, la jaro 1848 pli kaj pli alproksimiĝis. Estis tie en la ĉirkaŭaĵo de Pierre Leroux, George Sand, Proudhon kaj Karl Marx, kie Bakunin ricevis la plej grandajn impresojn precipe de Marx kaj Proudhon. Sed la ideoj de Proudhon estis tro idealista kaj tro metafizika por Bakunin, pli bone plaĉis al li la materialistaj ideoj de Marx, sed Bakunin jam estis malamiko de ĉiu ŝtato. Estas konate, ke Marx kaj Bakunin neniam povis unuiĝi, ĉiu iris sur sia vojo batalante kontraŭ la alia. Dum Marx fariĝis gvidanto de la komunista movado, Bakunin fariĝis gvidanto de la anarkista movado.

La 29. Novembro 1847 Bakunin parolis dum datreveno de pola ribelo de 1830. Tio estis la unua publika debato de Bakunin. Liaj ideoj estis nun firmaj, li ankaŭ ekkonis, ke li devis sin turni ne nur al la inteligentularo, sed precipe al la grandaj amasoj. Pro tiu parolado Bakunin devis forlasi Francion, li iris al Brüssel, kie ankaŭ estis Marx.

La 24. Februaro 1848 malfermis la pordojn de Francio por la forpelitoj, tio estis la komenco de la februara revolucio. Denove en Paris, Bakunin saltis en la revolucion kaj propagandis siajn ideojn inter la "Montagnards", ĉe kiuj li dormis, kaj manĝis. Ĉiam Bakunin esperis, ke la revolucio ankaŭ subakvigos Rusion, kaj por esti pli proksime, li iris denove al Germanio. Li estis en Köln, Berlin kaj Breslau. En tiuj urboj li volis influi la slavajn demokratojn precipe rusojn kaj ĉeĥojn. Pro la malsukceso, de la pola movado en Posen kaj Krakau Bakunin malaperis dum kelka tempo, kaj denove aperis dum la slava kongreso en Prag je la fino de Majo. La kongreso, ne povis finiĝi pro la ribelo de 12. Junio, je kiu Bakunin aktive batalis kontraŭ la militistaro.

Bakunin iris denove al Breslau, ĉar la movado en Prag ne sukcesis, sed pro policistaj ĉikanoj li forlasis Breslau kaj iris al Berlin. Li jam estis konata revoluciulo kaj estis nun malpermesate al li resti en Prusio, li volis iri al Dresden, sed la registaro ankaŭ malpermesis al li resti en Saksio. En Anhalto li povis resti. Bakunin esperis, ke la revolucio en Germanio denove ekvivos, la senaga vivo en Anhalto pro tio ne plaĉis al li, kaj li reiris al Leipzig, kie li loĝis kaŝe. Post kiam li sub granda danĝero ankoraŭfoje vizitis Prag, li denove vojaĝis al Dresden, kie la revolucia movado estis pli vigla ol aliloke. La 3. Majo 1849 oni konstruis barikadojn, la reĝo devis forlasi la urbon, la revoluciuloj havis por kelkaj tagoj la potencon en siaj manoj. Tio estis la lasta provo por plivigligi la revolucion, Bakunin estis la gvidanto kaj laŭ Marx (Revolucio kaj kontraŭrevolucio) li

estis bona gvidanto. Lia konduto kaj kuraĝo dum la defendo de Dresden, faris el lia nomo veran timigilon por la etburĝuloj. La provinco silentis kaj la revoluciuloj estis malbone armitaj, pro tio ili devis forlasi la urbon. Ekster la urbo sur libera kampo la revoluciuloj atentis la ekribelon de norda Bohemio, sed Prag ne ekmoviĝis. Nun la gvidanto de la revolucia armeo Born eksigis la armeon, ne aŭskultante la konsilon de Bakunin, kiu volis marŝi al norda Bohemio, por ekbruligi novan ribelon. Bakunin, Heubner kaj Richard Wagner (komponisto) veturis tra Freiberg al Chemnitz, kie ili esperis trovi novan fundamenton por antaŭenpuŝi la movadon. Bakunin kaj Heubner falis en la manojn de la prusaj reakciuloj, nur Wagner povis sin kaŝi.

Nun komencis tre malbona tempo por Bakunin; li estis sendita de malliberejo al malliberejo, de Dresden al Neustadt, de tie al fortikaĵo Königstein. La 14. Januaro 1850 li estis kondamnita al morto, sed oni pardonis lin al dumviva karcero. La saksa registaro donis lin al la aŭstra registaro pro la ribelo en Prag. Enkatenigata li venis al Prag kaj pliposte al Olmütz. En Aŭstrio li ĉiam estis katenita je manoj kaj piedoj, ja en Olmütz li estis alligita je la muro. En tiu situacio li restis dum ½ jaro. Same kiel la saksa, ankaŭ la aŭstra registaro kondamnis lin al morto la 15. Majo 1851 kaj transformis la punon al dumviva mallibero. De Aŭstrio Bakunin estis liverita al Rusio, alveninte al la landlimo, oni tuj forprenis de liaj manoj la aŭstriajn katenojn kaj almetis al li "patriajn", kiuj estis ankoraŭ multe pli pezaj. Nun li sidis ĝis 1854 en la fortikaĵo de Peter-Paul, kaj tiam ĝis 1857 en Schlüsselburg, de tie li venis kiel ekzilito al Tomsk. En Tomsk li restis dum 2 jaroj kaj edziĝis tie kun Antonie Kwjatkowsky, kiu estis la filino de pola ekzilito. Li ricevis la permeson translokiĝi al Irkutsk. La 17. Junio 1861 li adiaŭis de sia edzino kaj forkuris preter Nikolajewsk, Jokohama, San Franzisko, Panama, New-York al Londono, kie li alvenis la 15. Decembro 1861.

Bakunin ne forkuris de Siberio por ripozi en London, sed li tuj ekkomencis sian laboron por la revolucio. Kiel antaŭe tiu laboro lin puŝis de loko al loko, unue de London al Stockholm. De 1863 ĝis 1867 li estis en Stockholm, London, en Italio, denove en Svedio kaj London. En Paris li vidis ankoraŭfoje Proudhon, iris al Florenz, Neapel kaj tiam en la urbon Genf (Svisio).

Estis en Florenz, kie Bakunin fondis la unuan revolucian sekretan grupon. Tiu grupo ne vivis longtempe, sekvis la "societo de la socialista demokratio" pli poste, tiu grupo alinomiĝis "societo de socialistaj revoluciuloj", el kiu estiĝis la "Alliance", kiu ludis gravan rolon en la historio de la 1. Internacionalo. Bakunin ludis gravan rolon dum la kongresoj de la "paco kaj libereco- ligo" en Genf (1867) kaj Bern (1868), sed li konstatis, ke tiu ligo ne taŭgis por liaj celoj, pro tio li aliĝis al "internacia laborista asocio" la 1. Junio 1868.

Se oni volus priskribi la faradon de Bakunin en la "internacia laborista asocio", oni devus skribi la historion de tiu asocio, en kiu estis ĉiuj nuancoj, de la "koperativaj-reformistaj" ĝis la anarkistoj. Dum la germana-franca milito 1870/71, Bakunin kredis, kiel multaj aliaj, ke nun eksplodos la revolucio, li ne plu povis resti en Svisio kaj li kuris al Lyon, kie li alvenis la 15. Septembro 1870. La 28. de sama monato la lyona popolo ekribelis, sed ĝi estis venkita de la nacia gvardio. Bakunin estis kaptita. La revoluciuloj liberigis lin, kaj post kiam li vivis kelkatempe apud Marseille atendante novan ribelon (kiu ne okazis) li preter Genua iris al Locarno (Svisio).

Intertempe la batalo inter la du frakcioj Bakuninistoj (anarkistoj) kaj Marxistoj (komunistoj) tiel pliakriĝis, ke oni eligis Bakunin el la "internacia laborista asocio". Bakunin komencis migri de loko al loko en Svisio, kaj vivis en malgrandaj revoluciaj rondoj, li estis laca kaj maljuna, kaj suferis pro dolorema malsano. Pro tiu malsano li vojaĝis al Bern, kie estis lia amiko Vogt. En Bern tiu vere granda homo kaj revoluciulo finiĝis sian migradon. La 1. Julio 1876 M. Bakunin mortis. Li estis enterigata la 3. Julio. Je lia tombo parolis: Schwitzguebel, Schukowsky, James Guillaume, Elisée Reclus, Carlo Salvioni, Paul Brousse kaj Betsin. Se oni ofte mallaŭdas Bakunin pro la batalo kontraŭ Marx, la proletariaro tamen amas lin kiel batalanton por la proletara revolucio.

Zürich, 1446.

Nova parlamento kaj registaro de Litovio

Malgraŭ ĉiuj penoj, la elektojn al III. parlamento malgajnis la ĝisnunaj regantoj — klerikala burĝaro. La vekiĝanta popolo montris sian volon. Rezultoj estas jenaj:

		En la antaŭa (II.) parlamento	En la nuna (III). parlamento
Klerikaloj	kristanoj, demokratoj,	14	14
	unuiĝo de mastroj,	14	11
	federacio de laboro,	12	5
Liberaloj	kamparanoj-popolanoj,	16	22
	partio de mastroj.	—	2
Social demokratoj		8	15
Nacionalistoj		—	3
Fremdaj nacioj (germ., poloj, hebr. kaj rusoj)		14	13 (inkluz. Memellandon)
Entute		78	85

Ciferoj parolas plej elokvente. Plej multe gajnis social-demokratoj, plej multe falis federacio de laborist(trompant)oj. Klaskonscio kreskas. Evidentiĝis tre diverskolora parlamento. Do por starigi progreseman registaron, soc-dem. devis almenaŭ provizore eniri en koalician registaron kun liberaloj. Soc.-dem. prenis 2 ministeriojn 1. de internaj aferoj, 2. de klerigo. Grava laboro ekstaras antaŭ la nova registaro: likvidi la mezepokon kaj eniri almenaŭ okcident-eŭropan kulturvojon. Social-dem. iras en la parlamenton kaj registaron kun sekvantaj devizoj: 1. amnestio al ĉiuj politikaj enkarcerigitoj, 2. nuligo de politika polico, kiu enhavas ĉiujn forĵetaĵojn de la kultura socio, 3. nuligo de milita stato en la tuta lando 4. socia asekuro al laboristoj, 5. helpo al senlaboruloj. Ni esperu, ke ili ne cedos sian pozicion kaj ne fariĝos servistoj de liberaloj.

Komunistoj, kiuj pro neleĝeco ne rajtis starigi kandidatgrupojn sub sia vera nomo, ricevis ĉirkaŭ 20000 voĉojn, sed ili dispartiĝis inter ĉiuj distriktoj kaj perdiĝis. Se la soc.-dem. estus konsentintaj blokiĝi kun ili, tiuj ĉi voĉoj povis enkonduki ankoraŭ 2 laborist-deputatojn en parlamenton. Jen al kio kondukas troa partikularismo.

Unuiĝemulo.

Helpu al hispanaj revoluciuloj!

(Al laboristoj de ĉiuj landoj)

Baldaŭ la militjuĝo de Barcelono juĝos la 6 hispanajn kamaradojn: Solis, Maurin, Kolome, Rebul, Fremo kaj Rienci, kiuj jam estas malliberigitaj de kelkaj monatoj.

Ili ĉiuj apartenas al la plej aktivaj revoluciuloj, kiuj partoprenis profmovadon (sindikatmovadon) kaj speciale disvastigis la principojn kaj taktikojn de Ruĝa Sindikata Internacio (Profinterno).

Ili ankaŭ organizis la adeptojn al Profinterno (RSI) interne de ambaŭ hispanaj sindikatunuiĝoj. Al tiuj revoluciuloj oni minacas per malliberigo de 15 ĝis 25 jaroj.

Kvankam la militjuĝistaro ne havis punpruvojn, ĝi tamen malliberigis la kamaradojn. Do, kontraŭ la malliberigo elpaŝu la solidareco de la internacia proletariaro.

La Ekzekutivoficejo de Ruĝa Sindikata Internacio turnas sin kun la alvoko al laboristoj de ĉiuj landoj: —

Laŭtigu viajn voĉojn kontraŭ la persekutado de aktivaj hispanaj kamaradoj! Ni savu niajn kamaradojn, kiujn oni volas starigi antaŭ la militjuĝejo!

Sendu protesttelegramojn al registaro de *Primo de Rivera,* aŭdigu al ĝi viajn voĉojn!


Postulu de ĝi la senprokrastan liberigon de ĉiuj arestitaj hispanaj revoluciuloj!

Ekzekutivoficejo de Profintern
Gulin (6123).

La junian "S. R." ni ekspedos kun n-ro 41 pro redakciaj malfacilaĵoj.

LA LOKAŬTO KONTRAŬ LA BRITAJ KARBMINISTOJ

BILDOJ PRI LA BRITA BARAKTO



Vojo en brita minejo. Subinspektoro marŝas. Multaj vojoj estas eĉ pli malgrandaj



Maŝindrilado por poste diskrevigi la ŝtonon per eksplodilo



K-dinoj Starr, Marion Phillips, Susan Lawrence M. P., Ellen Wilkinson M. P., k-do A. J. Cook (la fama sekret. de la karbministsindikato) kaj k-dino B. Ayrton Gould

Brita helpkomitato por la edzinoj kaj infanoj karbministaj



Karbministaj infanoj en speciala komunmanĝejo



Edzinoj kaj infanoj de kimraj karbministoj



Subtera manĝo inter polvo kaj danĝero de brita karbminejo

El Britio

Ĝis hodiaŭ, 16. VI. 1926, la karbministaro brita oficiale ricevis ĉefe de aliaj laboristoj £ 500000. Per disvendo de paperlampoj en London la 10. VI. oni enspezis £ 7500. Sed estas proksimume unu miliono da lokaŭtitoj kaj la registaro per Baldwin senkaŝe anoncis anstataŭigon de sephora labortago per la okhora kaj maltigon de salajro je 10 %. Plenkuraĝe kaj obstine la karbministoj rifuzas akcepti tian proponon.

*

Dum la ĝenerala striko, la registaro procesis kontraŭ 1700 gelaboristoj. 629 malliberiĝis. 100 estas ankoraŭ juĝotaj.

488.

Morto en la Minejo

Jen tragediplena statistiko donita de Herbert Smith al Enketkomisiono (1924) pri la brita karbindustrio:

Dum ĉiu labortago
pli ol 5 homoj estas mortigataj,
pli ol 850 homoj estas difektigataj.
Ĉiun kvinhoron pereas unu vivo minista.
Ĉiun dekminuton difektiĝas kvin homoj.

Sur ĉiun 215000 tunojn da karbo elversiĝis la vivsango de unu laboristo.

Blindeco minacas multajn pro la trostreĉo de la okuloj en la mallumaj subteraj tuneloj. Kapitalismo rifuzas al la karbministoj salajron sufiĉan por aĉeti la vivrimedojn. *488.*

Laborista situacio en Hungario

Dum la lastaj monatoj okazis gravaj aferoj en Hungario; ŝajnis, ke la laboristaro komencas denove aktiviĝi, ĉar la granda mizero, senlaboreco kaj la blanka reakcio devigas ilin. Ĉi-sube ni intencas doni klaran bildon al la tutmonda proletaro, pri la nuntempa ĝenerala, precipe laborista situacio en Horthy-Hungario.

En la parlamento, kie troviĝas 24 soc.-dem. parlamentanoj, ili povas atingi nenian sukceson. Tre granda estis la espero, ke la frank-afero forbalaus la Bethlen-registaro, sed tio tute ne okazis — kaj hodiaŭ post la frank-proceso ili jam trankvile konstatas, ke ili havas la saman forton kiel antaŭe. — Kvankam tute pruviĝis, ke ĉiuj registaranoj sciis pri la falsigado, eĉ ili organizis ĝin.

La laborista movado — laŭ unueco — malfortiĝas, ĉar la malnova soc.-dem. partio antaŭ jaro eksigis el si mem la t. n. "maldekstrulojn"-radikalulojn, kiuj poste apartan partion fondis sub la nomo "Socialista Laborista Partio". Tiu ĉi partio tre vigle laboras inter la laboristoj; malgraŭ tio, ke la registaro tre persekutas ilin, iliaj gvidantoj estas preskaŭ ĉiam en karceroj pro plej diversaj kulpoj. Do, momente en Hungario ekzistas du Marx-aj politikaj partioj. En la sindikata movado ankaŭ estas malunueco. Granda eksiĝo okazis antaŭ du jaroj el la ferlaborista fakunuiĝo, de kie preskaŭ tuta fako, la tornistoj, eksiĝis (75 % el ili); nuntempe ili apartenas al nenia internacia sindikata unuiĝo.

La plej bonaj laborist-gvidantoj eĉ ankoraŭ nun vivas en eksterlando kiel rifuĝantoj. Amnestio ĝis nun ne estis farita, krom por kelkaj demokratuloj.

Hungario havas ĉirkaŭ 7—8 milionojn da loĝantoj, kaj laŭ oficiala laborista konstato estas 116000 senlaboruloj; sed tiu ĉi nombro ankaŭ ne estas tute certa, ĉar inter la terkulturistoj estas tre multaj senlaboruloj, do proksimume estas 150 ĝis 200000 senlaboruloj, el tiu ĉi granda nombro 50000 apartenas al la industrio, kaj ili plejparte estas ankaŭ organizitaj en la faksindikatoj. De la ŝtato ili ricevas nenian helpon, kaj nur tiuj povas ricevi iom da helpo, kiuj estas organizitaj en la soc. faksindikatoj. Kiel senlaborulan subtenon la faksindikatoj dum la pasinta jaro (1925) elspezis 16105553366 kr. (unu usona dolaro = 71—72000 hung. kronoj).

La laboristoj, kiuj havas laboron, ankaŭ sufiĉe mizere vivas, ĉar ili nur ricevas 45—60 % de la pactempa salajro. Por kompari la mizerajn salajrojn de diversaj faklaboristoj, mi donas oficialan "ekzistominimumo", laŭ laborista konstato, por homece vivi en Hungario ĉe kvinmembra familio, po semajno, por ĉiaspeca bezonaĵo ĝi bezonus: 793013 kr., do iom pli ol 10 dolarojn, kaj ĝenerale la salajro estas ĉirkaŭ 400000 kr., do ne tute 6 dolaroj.

Terlaboristoj kaj terkulturistoj. Terlaboristo ĉe diglaboro gajnas po semajno 240—360000 kr., terkulturisto sur la kampoj po semajno gajnas 150—240000 kr., terkulturistino gajnas po semajno 120 ĝis 180000 kr. Nature pri okhora labortago oni eĉ ne povas paroli. Ni devas noti, ke en Hungario ĝis nun preskaŭ nenia bienreformo ekzistis, la bienoj nun ankaŭ, kiel antaŭ milito, apartenas al la grandbienistaj grafoj, baronoj ktp. El la tuta kulturebla tero 73,3 % apartenas al la grandbienistoj.

Tekslaboristoj. Tiu ĉi fako antaŭ milito estis ĉe ni en komenca stato, ĉar la aŭstraj kaj bohemaj tekstilfabrikoj tiutempe apartenis al la monarkio, kaj ĝia aĉetanto estis ankaŭ Hungario; post la renverso la hungaraj kapitalistoj ankaŭ konstruigis grandajn tekstilfabrikojn, kie la gejunularo pleje estas ekspluatata.

En granda fabriko, kie laboras 1200 gelaboristoj, la meza salajro estas po semajno por plenaĝulo 200—250000 kr., por gejunuloj 100—150000 kr. Ĉi-sumoj ofte ankaŭ nur per kromaj horoj estas atingeblaj — ĉar la 48-horan laborsemajnon la fabrikistoj ne respektas —, po semajno ili devas labori 52—70 horojn.

Ministoj. Inter ili ankaŭ estas grandega mizero; ili gajnas po semajno 250000 ĝis 350000 kr., sed estas minejoj, kie po semajno ili laboras nur 2—4 tagojn. La senlaboreco inter ili ankaŭ estas granda, ĉirkaŭ 20—30000 senlaboruloj. La labortago estas ok- ĝis dekhora, sed la kapitalistoj klopodas efektivigi la dekduhoran labortagon.

Antaŭ kelkaj monatoj pro la granda mizero el minejurbo Ŝalgotarjan (apud la ĉekoslovaka landlimo) ekmarŝis al Budapeŝto piede 7000 ministoj kun la infanoj kaj edzinoj, por persone diri al la firegistaro ilian ne plu elteneblan mizeron, sed post kelkkilometra marŝado la ĝendarmoj post iom da batalo devigis ilin reiri.

Lignaĵistoj po semajno gajnas 300 ĝis 500000 kr. *Konstruaj laboristoj* gajnas po semajno 240000—500000 kr. La senlaboreco inter ili ankaŭ regas, ĉar la ŝtato kaj la urboj preskaŭ nenion konstruigas.

Transportlaboristoj, kiuj devas labori po tago 10—14 horojn, gajnas po semajno 400 ĝis 480000 kr.

Tramistoj en Budapeŝto laboras po tago 9—13 horojn kaj gajnas po monato 1600000 ĝis 1800000 kr.

Ferlaboristoj gajnas po semajno 250 ĝis 550000 kr.

El ĉi-supraj faktoj estas komprenebla la situacio de la hungara laboristaro, kaj ni tute ne devas miri, se po tago en Budapeŝto estas 5—20 sinmortigantoj, kiujn jam enuis la vivo. Dum la jaro 1924 estis 1323 sinmortigantoj, en 1925 la nombro jam pli multiĝis, ĉar 1819 homoj sin mortigis. Do, ĝenerale po tago 5. La plej diversaj malsanoj regas inter la laboristoj. 1925 ĝenerale ĉiutage 6 homoj mortis pro tuberkulozo.

Dume la fikapitalistoj ĉiam plendas, ke ili ja pagas je la tuta fabrikado, ĉar la grandan salajro-ŝarĝon ili ne povas elteni, kaj dum la jarfinoj, kiam la fabrikistoj faras la jarajn financ-bilancojn, la profito estas 30—50 kaj 60 %, sed por ili neniam sufiĉas. *Majo.*

Amikeco inter germanaj kaj francaj militistoj en la okupita Rejnlando

Sub ĉi-titolo mi skribis en "Senn." n-ro 31 de 29. Aprilo k. j., kio ja estus ĝojiga afero (soldata fratiĝo), se ĝi estus vera. Sed bedaŭrinde tio ne estas. Ili nur estas amikoj, se ili povas subpremi laboristojn. Do, mi devas aldoni por tiuj, kiuj atentas nur surskribojn,

se ili povas agi kontraŭ proletoj.

En la antaŭa artikolo mi priskribis la fiagon de germanaj policistoj, kiuj denuncis la germanajn junulojn Scherer kaj Hölz, ĉar ili propagandis inter la francaj soldatoj kontraŭ milito. Pro nesufiĉa scio mi faris eraron, skribante, ke Scherer kaj Hölz estis en franca malliberejo. Ili ĉiam estis nur en *germanaj* malliberejoj. La francoj nur kondamnis ilin. Unue ambaŭ estis en Wiesbaden kaj post kiam la francoj forlasis Wiesbaden, ili venis al Mainz. Sed, denove en germanan malliberejon. Do, tiu korekto de la faktoj ankoraŭ pli graviĝas la tutan aferon, ĝi estas nur pli forta kulpigo kontraŭ la germana registaro.

Kiam mia artikolo aperis en la supre nomita n-ro, k-do Scherer vivis jam ne plu. Li jam estis kadavro, kiu kuŝis sub

tero, kiu estis ornamita kun rondgirlandoj, portantaj ruĝajn bantojn kun revoluciaj surskriboj de venĝo kaj batalemaj ĵuroj.

Tagon poste, kiam mi forsendis mian unuan manuskripton, oni liberigis k-don Scherer el la malliberejo resp. malsanulejo (urbo, Mainz), ĉar oni antaŭvidis, ke lia morto estis certa — la ŝtato ne volis pagi ĉerkon al laboristo — kaj lundon, la 19. Aprilo, li ankaŭ jam mortis; do, oni ne kalkulis malĝuste! Ĉe la aresto k-do Scherer estis 135 funtojn peza kaj post la liberigo de preskaŭ tutjara restado en malliberejo de la "plej libera" (laŭ kia senco?) respubliko de la mondo li pezis ankoraŭ nur 67 funtojn. Kiam k-do Scherer en Wiesbaden konsultis kelkfoje la malliberejan kuraciston, tiu ĉiam pri-ridis la k-don kaj diris, ke li estas tute sana, li nur volas kaŝe liberigi sin de la laboro, aŭ eĉ atingi tutan liberecon. Nur kiam li venis al Mainz, oni estis preta helpi al li, sed tro malfrue. En Mainz la kuracisto kaj la geflegistaro estis favoraj al li kaj pro tio ankaŭ reprezentanto de IRH dankis al ili ĉe la tombo de k-do Scherer. La enterigo de la k-do okazis 22. Aprilo. La ĉerksekvantaro estis potenca demonstracio kontraŭ la burĝa mondo; partoprenis minimume 5 ĝis 6 mil personoj (el la urbo, kiu havas 26 mil loĝantojn; kaj estas banurbo, do granda parto de la loĝantoj ne apartenas al la laboristoj). Tiu estis ĝis nun certe la plej granda funebra procesio en nia urbo. Ĉeestis ankaŭ delegacioj de "ruĝaj frontbatalantoj" el Mainz, Wiesbaden, Weissenau kaj Frankfurt a. M. Estis kortuŝe vidi, kiam amaso da virinoj kun floroj en la manoj iris al la tombo, por doni al la k-do donacon — lastan signon de simpatio. La plej malgranda parto de la virinoj certe nur konis la k-don, sed ili sentis, ke li batalis kaj mortis por ili. Kaj tiun ekzemplon imitis la infanoj; infanoj en ĉifonoj ili estis, kiuj instinkte agis tiel, kaj se la malgranduloj ne havis florojn, ili prenis maneton da tero kaj ĵetis ĝin en la tombon freŝan, sur la ĉerko de tiu martiro. Dum tiu tute libervola (ne programa) ago de virinoj kaj infanoj tre pluvis, sed tamen neniu volis forlasi la tombejon sen esti apud la tombo. Antaŭe estis flamaj paroladoj de diversaj oratoroj kaj funebraj kantoj. La tuta entombigo estis signo de forto de laborista movado.

La komunistaj deputitoj Bartels kaj Piek jam kelkfoje protestis en la parlamento kaj postulis punon por la kulpaj policistoj Streblow (iama subleŭtenanto en la gvardio de la eksimperiestro), Lüttke kaj Blum. Plue Bartels ankaŭ dankis al la k-doj en Paris kaj London, ke ili postulas la liberigon de la 5 pluaj revoluciuloj (inter ili ankaŭ Hölz), kiuj ankoraŭ suferas en la malliberejoj pro kontraŭmilita propagando. IRH nun gvidas ankaŭ proceson kontraŭ la tri antaŭe nomitaj policistoj kaj la Wiesbaden-a kuracisto. Se oni en Germanio volas atendi, ĝis kiam oni punas la murdistojn de laboristoj, oni povas freneziĝi. Ĝis hodiaŭ oni ja ankoraŭ ne punis la murdistojn de Liebknecht, Luxemburg, Gareis ktp.

Nu, la granda merito de Scherer estis, ke li malgraŭ la grandaj suferoj eĉ sur la mortlito ne diris, de kiu li ricevis la flugfoliojn. Li prenis la tutan kulpon sur sin, li mortis kiel vera soldato de la revolucio.

La kioma martiro estas Scherer, kiu mortis por la bono de sia klaso? Verŝajne neniu povas precize respondi tiun demandon, ĉar la nombro de tiuj, kiuj mortis por la proletaro, estas tro, tro granda. Kaj kiom ankoraŭ sekvos? Sed "malgraŭ ĉio", diris Karl Liebknecht, kies paŝoj sekvis Scherer kaj ankaŭ devis morti kiel li, la granda kaj *konscia* batalanto por paco.

Oŝo (1390).

Soveta registaro estas stabila kaj vivados

Granda konsterno okazis en la angla konservativa partio, kiam la membroj legis la raporton de la delegitaro de tiu partio, kiu revenis el Sovetlando en Majo.

Gvidantoj, de la konservativa partio insistis, ke la originala malneto estu reverkata, ĉar ĝi estas "tro favora". Pro tio la raporto estis intence prokrastita ĝis post la striko.

La delegitaro konsistis el kvar konservativaj parlamentanoj, nome: Sir (angla titolo) Frank Nelson, S-ro R. Boothby, Kapitano R. C. Bourne kaj Leŭtenanta Kolonelo T. R. C. Bourne.

Ili certe ne dirus laŭdan vorton kie ne absolute indas.

Vi memoras, ke dum la striko niaj sovetaj kamaradoj tutkore kolektis monon por niaj strikantoj, kaj niaj ĵurnaloj disvastigis famon, ke la mono estis prenita for de la sovetaj laboristoj per forto. Nun la raporto ja tre malhelpas la presatakon kontraŭ Sovetlando.

Niaj ĵurnaloj priskribante vizitojn de delegitaroj al Sovetlando ĉiam bojas, ke estas "speciale kondukataj vizitoj", "registara statistiko" ktp., por senvalorigi raportojn.

Jen kelkaj elĉerpaĵoj el la raporto de konservativa partio:

"La bazo de la registaro estas la soveto, aŭ konsilantaro, ĉiujare elektata de la laboristoj", "Moskvo estas modela urbego rilate al ordo", "la ekonomia sistemo 'bone funkcias' ktp.". En la komenco de sia raporto ili diras, ke: "la ekzistanta soveta registaro estas pure kaj simple aŭtokratio"; ankaŭ ke, "klas-distingoj, kiel ni konas ilin (en Anglio) estas forigitaj . . . la laboristoj estas traktataj kiel klaso privilegiita en la komunumo . . . la sistemo de klaso kaj kasto (socie parolante) estas grandparte disrompita."

Estas interese legi ilian resumon pri la situacio de la laboristoj: "ĉiuj laboristoj (inkluzive soldatoj) ricevas ĉiutage proporcion da senpagaj sidlokoj en teatroj, koncertejoj kaj kinoj tra Sovetlando; ili plie estas liberaj de ŝtataj kaj urbaj impostoj; iliaj infanoj ricevas edukadon, aŭ tute senpage aŭ por malaltigita prezo; ili pagas malpli por sia loĝado kaj malpli por siaj manĝaĵoj, sed samtempe havas la unuan rajton al ambaŭ. Ili veturas malpli kare per tramveturilo, vagonaro, omnibuso aŭ kia ajn estu la loka maniero de veturado, kaj en la grandaj urboj ili aŭskultas al subĉielaj Radio-koncertoj laŭ skalo kaj sistemo multe pli progresintaj ol iu, kiun ni en okcidenta Eŭropo posedas".

La raporto asertas kaj pruvas per statistikoj, ke: "la registaro tute ne estas proksime al baldaŭa bankroto, kiu ideo lastatempe estis aŭdata en diversaj lokoj . . . La nuna financa programo estas sana kaj, fakte, preskaŭ malfleksebla . . . *Estas nedisputebla fakto, ke ne eĉ unu komerca aranĝo farita de la soveto kun alia lando depost la komenco de nuna reĝimo ne estis akurate plenumata* . . . Se oni ne konsiderus eblon de ekstera milito, la estonta iro de la eksportoj el Sovetlando laŭ la metodoj de la nuna registaro ne povos ne pligrandiĝi. Produktado ege pligrandiĝas . . . *Sindikatismo estas unu el la plej fortaj povoj en ĉi tiu nova ŝtato*".

"La deziro por scio inter la junuloj de ĉiuj klasoj speciale impresis nin, kiel ankaŭ la penoj de la registaro plenumi la postulon. La plano certe efikos plialtigi la edukan kaj kulturan normon de la popolo. Kun la edukaj penoj de la soveta registaro oni devas grupigi ĝiajn publikajn aktivecojn rilate al sano. Kaj ĉi tie ni sentas nin devigataj esprimi nian admiron por la sistemo, kiu jam aperigis tiajn resultojn . . . Pri arta kaj kultura disvolviĝo estas malfacile ne laŭde paroli . . . la orkestro de la moskva soveto estas, kredeble, senrivalo en Eŭropo . . . La armeo, konstanta kaj milicia, nombras ĉirkaŭ 560 000 de ĉiuj rangoj, kaj en ĝia administrado demokrateco estas la bazo. La kazernoj, al kiuj ni faris surprizan viziton, estas admirinde aranĝitaj . . . *La elstaranta trajto de la armeo estas edukado, speciale politika.*"

Ili diras, ke: "Rusio kapablas prezenti grandan kampon por prudenta lokado de brita kapitalo", kaj ke, "la demando rilate al antaŭmilitaj ŝuldoj kaj ia pruntedono estas neapartigeblaj partoj de sola problemo, kaj devus esti decidataj samtempe, se la soveta registaro povos esti en situacio plenumi siajn devojn".

"Ni konsilas, ke la registaro de lia Reĝa Moŝto observu la situacion tre atente, por ke neniu favora okazo estu maltrafata por sekurigi inter ni kaj Rusio ian diplomatan kaj komercan interkonsenton kontentigan al ambaŭ partioj."

Ili konkludas: "La revolucio de 1917 estis tro profunda por esti nur pasanta fazo, kaj ne estas kia ajn dubo, ke la nuna registaro en Rusio estas stabila kaj vivados . . . La nuna sistemo, fakte elvolvis ordon el aferstato, kiu antaŭ kelke da jaroj povis esti priskribata nur kiel ĥaosa buĉejo".

Do, niaj kapitalistoj kaj konservativuloj konstatas la forton de Sovetlando kaj saĝe ne volas perdi frandan pecon.

E. E. Yelland (164).

KRONIKO

Britio

Kursoj sub N. C. L. C. (Nacia Konsilantaro de Laboristaj Kolegioj) funkcias ĉe Peterboro kaj Southend. La 12 kursoj subtenitaj finance de L. C. C. (la urbestraro de Londono) finiĝas antaŭ la 3. Julio anstataŭ kiel kutime antaŭ 17. Julio. Jen unu rezulto de la burĝa propagando per ŝtatŝparo! En Laborista Klubo ankoraŭ daŭras kunvenoj. En la korespondfako de N. C. L. C. 24 studentoj lernas Esp. kaj ĝi estas interalie temo por 75 senpagaj kursoj donacitaj al la karbminista federacio. La "Plebs" komencas tradukkonkurson en sia julia n-o.

Ĉekoslovakio

Plzen. Laborista Ligo esperantista en Ĉekoslovakio, centro Plzen, pritraktis en sia komitata kunveno de 10. Junio aranĝon de granda manifestacio de laboristaj Esperantistoj en Frantiskovy Lazne (Franzensbad) antaŭ monumento de Esperanto dum Aŭgusto. Dato ne estas fiksita, aŭ 1. aŭ 8. Aŭgusto. Kiu interesas pri tiu ĉi manifestacio sciigu tion al supre nomita "Ligo". Socialdemokrata parlamentano Pik Ladek, urbestro de Plzen, donacis al "Ligo" 500 kr. por esperanta biblioteko. *5095.*

Francio

Grenoble. La kurso, komencita en lastjara oktobro kun 20 lernantoj, fariĝis duagrada kaj estas sekvata de 7 k-doj. La tiea Esp. Lab. Grupo estas malforta, ĉar ne ekzistis antaŭe Lab. Esp. movado. Por instigi niajn k-dojn, ĉiulandaj SAT-anoj bonvolu sendi kelkajn liniojn al: Esp. Lab. Grupo, Bourse du Travail, 7, quai Criqui, Grenoble (Isère) Francio. *132*

Lyon. La 22. Aprilo, unuagrada kurso estis malfermata kun 14 enskribitoj. Gvidas ĝin: k-do Nicollet. La 1. Majo, kun granda verda flago, Esp. Lab. Grupo partoprenis la manifestadon. 50 gek-doj esperante kantis "Internacion" kaj "Revolucion". 150 lernlibroj estis venditaj. Burĝaj ĉiutagaj gazetoj menciis ĉeestadon nian. — Grava organizaĵo: "Comité mixte d' Unité Syndicale" (Miksta Komitato por realigi sindikatan unuecon) eldonis 5000 ekzempl. broŝuron pri "Sindikata Unueco". El la tre interesa enhavo ni rimarkis tradukon el raporto de sindikata konferenco en Göteborg (24 Jan. 1926 esperante verkita, kiun ricevis la Lyon'a Komitato. — Semajna kom. gazetaro "Cri du Peuple" (Popolkrio) regule presigas niajn artikolojn pri esp. propagando, kursoj. festoj kaj SAT. *Grupestraro.*

Al ĉiuj liberpensulaj SAT-anoj! En Lyon pli kaj pli laboristaj organizaĵoj konvinkiĝas pri utileco de komuna lingvo por internaciaj rilatoj. Nun, jena grava proletaria asocio komisias nin zorgi pri interkorespondado kun alilandaj liberpensulaj grupoj pri specialaj temoj (liberpensula movado, agado de klerikaluloj, edukaj aferoj ktp.) Ni do alvokas ĉiujn k-dojn rilatigi sian ateistan grupon kun: Fédération de Libre Pensée et d'action sociale du Rhône, 4, rue Ozanam, Lyon IV (Francio). Tiu Federacio kaj 3 sekcioj pruvis sian simpation al nia movado, aniĝante subtencele al nia grupo. Certigu ilian konvinkon, ke ni havigos al ili korespondaĵojn. (Nur estas akceptataj oficialaj demandoj, ne privataj).

Esp. Lab. Grupo de Lyon.

Le Chambon-Feugerolles. En tiu urbeto, apud St. Etienne, okazis propaganda kunveno en ĉambro Lenin de urbdomo (ĉar tuta urbestraro estas kompartiana) la 13. Junio. Ĉeestis pli ol 30 gek-doj, kiuj tre interesiĝis pri parolado de k-do M. Roux, kiu komprenigis la ĉefan rolon, kiu povas ludi por proletariaro internacia helplingvo. La publiko estis tre impresata, vidante gazet- kaj dokumentekspozicion. Ni trafas tre bone la celon serĉitan, kiam ni povas tuj pruvi per faktoj niajn asertojn pri uzebleco kaj disvastigeco de Esp. en ĉiuj landoj kaj medioj. Tiel ni ĉiam faras. Post la parolado, k-do Dimier alvokis por starigo de kurso, kiu komence funkcios perletere, sub gvidado de Lyon'a k-do Gros. Jam 8 k-doj enskribiĝis. Lokaj gazetoj anoncis kaj raportis pri la kunveno.

Germanio

Freiburg en Brsg. Post dujara malapero de laborista Esperanto-unuiĝo en nia urbo la 28. Aprilo 1926 fondiĝis Laborista Esperanto-Klubo "Progreso" Freiburg La klubo ne estas aliĝinta al granda nacia aŭ internacia Esperanto-asocio, sed ĉiu membro de ĝi povas aliĝi al iu ajn asocio laŭvole kaj laŭpove.

Estas elektita jena estraro: W. Huber, fervojisto, Freiburg, Merianstrato 23 (samtempe sido de la oficejo); 1. sekretario K. Ruhnau, elektra muntisto, 2. sekretario K. Maag, tramvojisto, kasisto L. Schuler, bakisto.

Ĉiumerkrede je la 20. h. la klubo kunvenas en restoracio "Zum Landsknecht" (Katharinenstrato 18), en kiu ankaŭ elpendadas "Heroldo" kaj "Senn". Gesamideanoj trapasontaj nian urbon bonvolu ne forgesi honori nin per ilia apero. *W. Huber.*

Nederlando

Amsterdam. Dum Pentekosto okazis ĉi tie la kongreso internacia de la soc. junularo. Ni uzis ĉi-okazon por disdoni kvinlingvan flugfolion, kiun ni presigis speciale por ĉi-kongreso. Pri la kongreso mem ni ne povas raporti multe, ĉar mi ĝin ne partoprenis, nek iu el niaj anoj. Laŭonidire tamen okazis tre bedaŭrinda afero, nome, ke la kongres-

Daŭrigota sur 8a paĝo

Bulgaraj okazintaĵoj postmilitaj

(Fino)

La teroro de registaro Aleksandro Cankov plue furiozis. Bulgario neeviteble ruliĝadis en katastrofon, abismon. Pro sangaj perfortoj kaj krimoj komencis timi ankaŭ multaj burĝaj elementoj, kiuj ĝis tiam subtenadis la registaron. Sed la registaro iris pluen sur ĝia sanga vojo. Ĝi kreis "leĝon pri ŝtatdefendo", kiu estas pli malbona ol ĉiuj similaj leĝoj en la mondo. Tuj post apero de tiu leĝo estis dispelitaj bulgaraj laboristaj sindikatoj, kiuj nombris 67 795 anojn. Same estis malpermesita kooperativo "oslobodjenje" (esp. lingv. liberigo), kiu havis en Bulgario 140 komercajn reprezentejojn kaj 400 agentejojn. Milionoj da laborista havaĵo estis konfiskitaj je utilo de ŝtata kaso (banko), ĉiuj opoziciaj presorganoj estis sufokigitaj.

Sed grandan opozician bonhumoron de bulgaraj laboristamasoj estis ne eble sufokigi pere de tiuj novaj perfortoj. Ĝi plue kreskegadis. Laborkrizo kiu aperis, nur plifortigis tiun bonhumoron. Kion nun devis entrepreni la registaro? Politika teroro, kiu atingis neaŭdeblan altecon, montris sin kiel ne taŭga ilo. *La registaro decidis ekstermi ĉiujn politikajn kontraŭulojn.* Komenciĝis sistema mortigado de terlaboristaj kaj komunistaj gvidantoj en tuta Bulgario. La registaro opiniis, ke ĝi tiamaniere senhavigos opozician movadon de ĝiaj spiritgvidantoj, kiuj kondukis kaj direktis ĝin. Sed ĝi (registaro) nur pere de tio verŝadis oleon en fajron, kaj transverŝadis la glason de popolsuferado.

La lastaj sangaj atencoj en Bulgario estis nur esprimoj kaj rezultoj de senhonta teroro de registaro de Aleksandro Cankov. Ili elkreskis el ne eltenebla situacio, kiun kreis la registaro mem. *Ĉiu ebleco de laŭleĝa batalo estis forprenita, ne ebla.* La registaro mortigadis opoziciulojn, ne plu unuope, sed amase. Oni parolas, ke eĉ la reĝo Boris mem, vidante, ke la registaro puŝadas la landon en neeviteblan abismon, postulis ŝanĝon de la reĝimo. Li deziris trankviligon de l' popolo. Sed ĉiujn intencojn de la reĝo malebligis la generaloj Rusev kaj Vlkov. *Ili preparis atencon al la reĝo, por montri al li la neeviteblecon de teroro.*

Estas rimarkinde, ke la registaro kelkajn tagojn antaŭ tiu atenco al la reĝo "malkaŝis" komunistan konspiron, kiu havis por celo ekkomenci la revolucion en Bulgario. Tiu revolucio devis komenci la 15. Marto tiu-ĉi jare. Kaj jus nun venas tio, kio malkaŝas malnoblan ludon de la bulgara registaro. La revolucio devas *komenci la 15. Marto,* kaj la reĝo Boris elveturas al promenado ekster la urbon, eĉ *sen akompanantaro 14. Marto!?* La "revolucio" sur sojlo, la revoluciuloj kovris la landon, kaj la reĝo tute sola promenas en ĉirkaŭaĵo de Sofio —?

Estas okulvideble, ke tiu atenco estis preparita nur por malebligi la ŝanĝon de reĝimo. Des pli tio praviĝas, ĉar ĝis nun oni kaptis nek unu atencanton, kiu pafadis al la — reĝo!

La atenco en la preĝejo St. Nedjelja en Sofio, estas esprimo de unu senkompate buĉata, piedpremita kaj tute disreviĝinta popolo. Tiajn opajn akcidentojn, kiuj ne utilas al liberigo de popolo, uzas nur tiuj homoj, kiuj havas nenion plu por perdi, kaj al kiuj estas *la morto nura eliro el la vivinfero.*

La registaro de Aleksandro Cankov, tuj ekprovis kulpigi fremdajn landojn: Rusio kaj Jugoslavio. Tio estas simpla kaj stulta manovro. Fremdaj landoj povas interesiĝi pri malpaco en Bulgario; sed neniu saĝa homo povas konvinkiĝi, ke ŝtataj oficistoj okupos sin per bomboj kaj "inferaj" maŝinoj, ĉar oni scias, ke tiuj iloj favoras reĝimon, kontraŭ kiu oni uzas ilin.

Tiu vero sin montris en tuta ĝia teroreco, post atenco en katedralo St. Nedjelja en Sofio. La registaro de Cankov eluzis tiun atencon, por pligrandigi kaj pliakrigi la teroron kontraŭ opozicio. En Bulgario tuj post tio komencis vera buĉado de opoziciuloj. Registaro de Aleksandro Cankov mortigas ĉion, kio al ĝi staras survoje, senescepte, ĉu iu estas komunisto, terlaboristo aŭ radikalulo. Antaŭ ne longe estis mortigita Josip Herbst, sinjorara ĵurnalisto, kiu kun komunismo havis neniajn rilatojn. Post ses tagoj de la atenco en la katedralo St. Nedjelja, la 22. Aprilo, en Bulgario estis tridek mil enkarcerigitoj

Ni

(Niaj konsideroj)

Noto de la Redakcio: Ĉio kursivlitere kompostita prezentiĝas kiel: ĉu titolo de iu ajn SAT-libro, ĉu titolo de artikolo (aperinta en "Senn." aŭ "Senn. Revuo" depost la unua de Januaro), ĉu ĝenerale disvastigitaj SAT-signaldiroj aŭ esprimoj

"Kiam torentaro de kontraŭdiroj plenigas socibarelon — barelringoj de la lasta kreviĝas — tiam aperas Revolucio", ĉisence skribis Marx.

Ni konscias Marx-an koncepton, ni atentigas la mondon al ĉi-kontraŭdiroj kaj ni kulturage preparas revolucion.

Nia tasko — grandega — ĝia solvo — nia celo, do ni unue turnu nian precipan atenton al nia meminstruado. *Ni legu,* ĉar *A-B-C de sennaciismo* ni nepre perceptu mem kaj nur poste instruu laŭ ĝi la mondon. Ni *kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo,* por ke *ni venu al estonta soci' tra baroj de naci'.* Lingvo komuna — nia bazo, do ni laboru por enkonduki *Esperanton en lernejojn.* La sola respondo kontraŭ la demando: *por kio mi lernas Esperanton?* — estu: *por la klasaj celoj de la laboristaro.* Ni parolas: *for la neŭtralismon;* ni batalas *kontraŭ dio,* ĉar ĝi estas travivaĵo de la pasinto. Nia dio, nia la sola supro — estu nia celo kaj nia kulturo. Ni ĉiam studadu, ni bone observu *tutmonda*-n *konjunkturo*-n. Nenio malaperu el nia vido: nek *la ekonomia situacio de laboristoj en Litovio,* nek *la blanka teroro en Bulgario,* nek *laborista vivo en Palestino.*

Ni neniam forgesu nepriatentitan *staton de senlaboruloj en Bavario,* same kiel *atakecon kontraŭ radikaluloj en usonaj profunuiĝoj.* Ĉio ĉi, ĉu demando de *soldata vivo en Ĉekoslovakio,* ĉu *laborista movado en Egiptio* — havas sian grandan instruan signifon kaj valoron. Sed ni ne forgesu, ke intelektmatura homo estu diversflanke scipova, ni do ne fariĝu nuraj specialistoj de klasbatalo kaj sociologio. Ĉu *evoluo de la tekniko,* same kiel problemo *pri malsanoj,* aŭ kaŭzo de *biologia tragedio de la virino,* ne estas interesega objekto de la esploroj, por ĉiu konscienca prudentulo? Ĉu troviĝas iu, kiu malsaĝece penus pruvi, ke la *kemio de la universo* kaj fenomenoj *el la mondbildo de la nova fiziko* neniel influas je stato de nia *malgranda terbiblio* kaj fin-fine fariĝas kaŭzoj de la ekonomia, socia kaj politika evoluoj?

Por ke ni estu batalpovaj, por ke ni estu kapablaj *por finlukto socia* kontraŭ nia malamiko, kiu posedas "multjaran kulturon" — ni laboru por *kreskigi kulturon novan sub brila stel'.*

Ekarmitaj per la sperto kaj scio ni helpos al la homaro, disbati katenojn de la sklaveco.

Ni senvualigas antaŭ ĝi *vera*-n *fizionomio*-n *de la nova bulgara registaro;* ni klarigas al ĝi, *kial kaj kiel britoj venkis hindojn;* ni montras al ĝi kaŭzojn de la *dekadenco de germana kapitalismo.* Ĝi komprenos, kial *faŝistoj uzurpas kooperativojn en Italio* kaj — *germana registaro provizas sin kun kirasitaj veturiloj.* Ĝi komprenos, ke: *ĉu senarmiĝo* estas *konferenco por malpliigo de la armiloj!?*

Kontraŭ la demando: *kiuestas kulpa?* — ni firme respondas: — *la sinjoroj de l' pano!*

Ni instigas la homaron *kontraŭ la burĝa klasjuĝistaro;* ni komprenigas ĝin, *kion devas fari proleto, se revolucio alproksimiĝas;* ni parolas al ĝi: *organizu vin kontraŭ viaj parazitoj!*

Ni laboras; obstine *ni fosu nian sulkon!* Nia celo — glorinda, nia tasko — giganta, nia forto — je nia unueco, je nia SAT-aneco, do nia alvoko *al ĉiuj sinceraj unuecfrontanoj* estu aktuala postulo de la momento.

Neniajn personajn tendencemojn, neniam estu *SAT en danĝero* de partieca devojiĝo, nenian hipokritecon duoblesencan en niaj paroloj!

Kaj ni jam sentas firman grundon sub niaj piedoj; jam *super la detruendaj landlimoj SAT flirtigas sian standardon,* jam ni kredas, ke post nelonge — ne plu estu — *senlabora koaksoserĉanto* aŭ *morto de Blanjo* — kutimaj fenomenoj de nia ekzistado.

Ni prognozas en nia himno:

Ekregos jam spiritlibero
Post proletara finbatalo,
Kaj ĉesos de l' sklavec' sufero
Post ekspluatantara falo.

Dm. Al. (1188)

---

kaj kvar mil mortigitaj homoj. La registaro tion neas, kaj ĝi skribas, ke estis enkarcerigitaj nur 1500 kaj "nur malmultaj" mortigitaj — "pro ekprovita forkuro"! Sed registaro senhonte trompas la mondon. Al ĝiaj mensogoj povas ekkredi nur tiu, kiu ne konas la cirkonstancojn kaj la situacion en Bulgario. *Nur pro la atenco en la katedralo estis enkarcerigitaj pli ol 6000 homoj, kiuj estis indikitaj kiel kulpuloj.* Oni esploru bulgarajn malliberejojn, kaj je sama loko sin certigu: kiamaniere estas eble, ke en unu atenco partoprenas 6000 personoj?

Al la sanga reĝimo de Aleksandro Cankov helpas ankaŭ unu parto de la eŭropa ĵurnalaro. En tio la plej hontindan rolon ludas Wiena "Neue Freie Presse", Londona "Times" kaj Pariza "Temps". Tiuj ĉi ĵurnaloj per senekzempla senhonteco kaj abomeneco defendas la sangajn krimojn de la kamaril-oficiraraj bandaĉoj en Bulgario. Sub protekto de tiuj-ĉi presorganoj bulgara registaro *buĉadas kaj ekstermas bulgaran popolon.*

Je flanko de la bulgara registaro staras ankaŭ eksterlanda diplomataro, ĉar ili proponis al siaj registaroj la pligrandigon de la armeo en Bulgario je dek mil armitaj homoj.

Bulgara registaro tuj armigis ne dek sed tridek mil homojn, al kiuj ĝi donis armilojn, por ke ili helpu ĝin ĉe plenumado de teroro.

Pro tiuj sangaj kaj teruraj krimegoj de bulgara registaro estas devo de ĉiuj homoj, kiuj prave pensas, de ĉiuj verkistoj kaj kulturaj laboristoj, per ĉiuj fortoj kontraŭstari la mortigadon de l' bulgara popolo. La tuta honesta gazetaro batalanta por libereco, devas agi en ĉi-direkto.

Estas en intereso de la kulturo kaj civilizacio, deflankigi reĝimon de Aleksandro Cankov. Tiu reĝimo prezentas ne nur rektan danĝeron por la paco sur duoninsulo Balkano, sed ankaŭ por la disvastigado de liberpensulaj kaj demokratiaj ideoj ĝenerale. Laŭ "Dom" de la 27. Majo.

Elĥorvatigis: *Adriatikuloj.*

Ĉielregno

L. IVN

Ho, di-benita lando de l' prudento,
homecon vian gardu kun ĵaluz',
modelo restu vi por ĉiu gento,
evitu reton de l' milita ruz',
por ke, se nove flagros venĝoflamo,
blasfemos veoj, fluos sangofont',
eĉ tiam restu unu land' de l' amo
por trovi ie fidon pri l' estont'.

Julio Baghy ("En Svislando", marta n-o de "Esperanto")

Ho, di-benita lando de l' prudento,
hotelo oportuna de l' tutmond',
mirakla uj' de paco kaj silento,
kaj rifuĝej' por ajna vagabond'.

Homecon vian gardu kun ĵaluzo,
(Ĝi estas via ŝildo kaj reklam'.)
Kaj ne forgesu lasi sen akuzo
murdiston fian! Estu for malam'!

Modelo restu vi por ĉiu gento,
ho, respubliko, kie mankas strik',
kaj kie burĝo pia, diligenta
laboras mem (laŭ Kristo!) en fabrik'.

Evitu reton de l' milita ruzo,
(Milito estas tre danĝera ŝerc'!),
pli bone zorgu, zorgu, ke sen uzo
ne restu via reto de komerc'.

Por ke, se nove flagros venĝoflamo
kun akompano de ŝrapnela ŝpruc',
vi restu ripozhejm' (komforta, fama),
la hospital' de burĝa "Ruĝa Kruc'".

Blasfemos veoj, fluos sangofonto,
kaj malstabilos la milita ŝanc'.
Sed vi ne tremu: el alia fonto
vi ĉerpos fidon pri aktiv-bilanc'.

Eĉ tiam restu unu land de l' amo,
de l' am' al frank', dolaro, marko, lir'.
Pri via toleremo ekdeklamos
pac-trubadur, l' amanta kavalir'.

Por trovi ie fidon pri estonto
al viaj lagoj fugos burĝa band'.
Sed pelos ĝin revolucia tondro
Terkoron sondi sur la laga fund'.

(Daŭrigo de la Kroniko)

estroj rifuzis kuŝejon en la tendaro al la germanaj senlaboraj kamaradoj, kiuj piede venis ĉi tien. Ankaŭ tre malagrable tuŝis nin la netolerema spirito, kiu regis la kongresanojn, aŭ almenaŭ la ĉefulojn. Ekzemple oni absolute malpermesis akcepti iun ajn flugfolion, tiel ke eĉ komence oni rifuzis niajn pri-esperantajn cirkulerojn! Nur ĉar ni obstine etendis la manon kun la papereto kaj kelkajn paŝojn akompanis la gejunulojn, ni povis disdoni la unuajn. Poste, kiam ankaŭ kelkaj germanaj Esp-istoj, kongresanoj, ankaŭ disdonis, ni havis pli multe da sukceso.

La 31. Majo vizitis nin germana k-do, kiu parolis al ni pri la anarkista mondorganizaĵo TLES. *GB.*

La kongreson de CPH (22. ĝis 24. Majo en Amsterdam) salutis per kelkaj esperantaj leteroj, proletoj el Hispanio, Germanio kaj Sovet-Unio. Prelegon de la leteroj la kongreso akceptis kun ripetaj aplaŭdoj. — Dum la lasta kunsido de la kongreso la prezidanto parolis mallonge pri Esp-o, menciante ĝian konstantan disvastiĝon, ĝian grandan valoron por laboristoj kaj fine li konsilis al la partianoj lerni ĝin. Kia diferenco kompare kun la antaŭnelonga kongreso de SDAP! *NK.*

Enschede. Sekcio Enschede de la Ned. Fed. de Lab. Esp. disdonis je kunvenoj de la 1. Majo flugfolieton, en kiu estis atentigata pri SAT kaj ĝiaj organoj kaj pri la praktikaj profitoj, kiujn la laboristoj povas akiri per la servoj de SAT. Grupoj, kiuj eventuale volas aĉeti kvanton de tiu flugfolieto, turnu sin al k-do G. P. de Bruin, Wagelerdw. str. 58 B, Enschede. *GPdB.*

Hago. La 7. Majo la hagaj Laborist-Esp-istoj aranĝis propagandan kunvenon, en kiu parolis k-do Pech el Slovakio kaj klarigis per lumbildoj. Hazarde ĉeestis ankaŭ angla Esp-istino, kiu fortege instigis la ĉeestantojn lerni la lingvon Esperanto, por rilati kun niaj eksterlandaj gek-doj. Ĉeestis 150 personoj. *Iu.*

Helder. Vizitis nin germana k-do, SAT-ano. Ĉirkaŭume 50 AJC-anoj partoprenis la internacian gejunularan feston en Amsterdam. Ege sentiĝis la bezono de Esp-o. Speciale post kiam montriĝis, ke k-doj, kiuj depost Januaro studas Esp-on, jam bone povis konversacii kun la eksterlandaj gastoj, Esp-istoj. Dum la intern. gejunulara festo parolis esp-lingve k-do Tetley el Londono pri ĝenerala striko en Anglio. *JD.*

Sovet-Unio

Perm. Esp-o ekmarŝis nun ankaŭ en Perm (urala fabrik- kaj universitaturbo). Oni organizas distriktan komitaton de SEU komencis ĵus labori du kursoj, unu elementa kaj unu perfektiga. Gvidas ilin H. Frank. Loka ĉiutaga gazeto "Zvezda" jam regule uzas materialon el "Senn.", de "Proletaria Esp.-Presservo" kaj leterojn de alilandaj laboristoj. Ankaŭ kelkaj murgazetoj malfermis anguleton "kiel vivas kaj batalas niaj eksterlandaj kamaradoj". Adreso de la Perma Esp. Societo: ul. Lenina 25 Mestkom Rabis. Kunveno ĉiulunde je la 7 h. *(2144)*

Saratov. En Saratovo ekzistas nun 4 esp.-grupoj: 1. esp. sekcio ĉe Radio-amatora societo el pli ol 15 personoj, priservantaj esperantlingve la societon, 2. esp.-grupo el 6 blindaj lernantoj ĉe blindullernejoj en infandomo n-o 28 (interkorespondadas kun alilandaj blinduloj-esp-istoj kaj abonas "Esperantan Ligilon"), 3. esp.-grupo el 25 komsomolanoj (komunistoj-junuloj) lernantaj esp-kurson sub gvidado de k-do Koŝelev (SAT-ano) ĉe fervoja stacidoma komunista ĉelo, kaj 4. sennaciecmora rondeto el 5 personoj: Sajapin, Biĉkova, Koŝelev, Kuŝkov, Cvetkov, eldonantaj sian manskribitan jurnalon "Saratovano", traktanta pri sennacieca vivmaniero kaj moraro (eliras n-o 4). La grupo komencas vastan interkorespondadon pri sennaciecaj temoj. *SAT-ano 2985.*

Leningradon revenis k-do Poniŝevski, kiu dum pasinta monato Majo vojaĝis en Ukrainion kaj faris tie *36* Esperanto-lekciojn. Resulto estas organizado de preskaŭ *cent* esperanto-grupoj kun pli ol *2000* junaj adeptoj de la lingvo internacia. Sekvontan propagandan vojaĝon la kamarado notis al Blank-Rusio. *B. Rudovitz.*

RECENZEJO

Libroj

Studvojaĝo en Sovet-Rusio. Ricevebla de *Sveda Laborista Esperanto Asocio, Göteborg I.* Formato: 16×24 cm., 36 pĝ., Prezo nemontrita.

La bone ilustrita broŝuro enhavas la raporton de la sveda ŝtatoficista delegacio pri la vojaĝo ruslanda dum Aprilo 1925. Ĉiurilate ĝi donas valorajn sciigojn pri la stato en USSR. Speciale estas pritraktata la organizformo kaj laborkondiĉoj de l' rusa Unuiĝo de PTT. Mi povas rekomendi la interesan broŝuron al ĉiu. *Yerk*

Ruĝo kaj Blanko *de L. Ivn. SAT-Eldono,* Serio: Literaturo. Formato, 15×12 cm, kartonita.

Jen aro de sep mallongaj noveloj. La unuaj estas grupigitaj sub la titolo "Cimoj". Ĉiu noveleto havas sian "cimon", ĉu kontraŭ-revoluciulo, ĉu malhelpulo al la nova sociordo pro mem-intereso aŭ manko de energio, ĉu perfidulo pro malkuraĝo. La tri lastaj rakontoj estas humoraĵoj kaj ne tiom plaĉis min kiel la unuaj: estas "Delegitaro", pri falsaj georgianoj kiuj "atestas" pri la teruraĵoj de bolŝevikoj en Georgio; "Nekrologo", kiu eble transpasas la limon de bongusto, ĉar la ŝerce traktita nekrologo estas pri reala homo, Samuel Gompers! La lasta skizo, "Kim kaj Roza", temas pri du junaj gepioniroj; oni povas nur esperi, ke ne ĉiuj pioniroj estas tiom frumaturaj kiom ĉi-tiuj du kaj ne tiom severe kritikas la gepatrojn kaj konatulojn ... ankaŭ, ke ili havas en cerbo lokon por alio krom adorado al revoluciaj ĉefoj. Entute ĉi libreto estas certe leginda kaj ĝia valoro kuŝas precipe en tio, ke la noveletoj estas originale verkitaj en nia lingvo. *E. K. L.*

Gazetoj

Represis el "Senn." *Der Freidenker,* Berlin, 1. 5. 26 (n-o 5): "El la Ĉekoslovakio!" (Senn. 26). *Signalen,* Stockholm, 29. 4./6. 5. 26 (n-o 17 ĝis 18): "Triumfoj de Esp!" "Esp. akceptata de la finnlanda registaro!" "Konsekvencoj" (F. Azorin) (Senn. 79/81). *A Batalha:* Lisboa, 22. 5. 26: "Por kiu vi laboras, patro?" (Senn. 80).

Represis el S. R. *A Comuna:* Porto, 1. 5. 26 (n-o 7): "Mortis proleto!" (Julio 1925).

Represis el div. gazetoj. *El Socialista:* Madrid, 14. 4. 26/4. 5. 26: "Informojn pri la VI. SAT-kongreso!" *Naŝ Putj:* Kremenĉug, 2. 3. 26 (n-o 49): "Ĉiu kom. junulo devas lerni Esp. 1. 5. 26 (n-o 99): "Kongreso de la Holanda Kom. Partio" (Esp. komuniko). 9. 5. 26 (n-o 104): "Pri la esperanta rondeto de la fervojista Klubo-Kotlov!" *Proletarij:* Ĥarkov, 6. 5. 26 (n-o 101): "Letero de Frankfurt'a lab. Esp-isto al Esp-istoj de Enakievo (Ukrainio)!" *Radjanski Seljanin:* Kremenĉug, 28. 4. 26: "Pri Zamenhof-vespero kaj Esp-ekspozicio!" *New-Yorker Volkszeitung:* New-York, 26. 2. 26: "Rusio kaj Palestino!" Zionismo ne apartenas al klaskonsciaj judaj laboristoj. *Mitteilungsblatt der I. T. F.:* Amsterdam, Majo 26 (n-o 5): "La ligo de nacioj kaj Esp.!" "Esp. en Bulgario!" "Esp. en int. organizaĵoj!" "Esp. en Rusio!" "Esp. en la lernejo!" "La studentoj de Rio de Janeiro proponas Esp. por la scienco!" "Esp. en la I. T. F.!" *Los Pensadores:* Buenos Aires, Feb. 26 (n-o 118:) "Literatura Esperantista!" *Int. Arb. Association:* Berlin, 22. 5. 26 (n-o 65): "Pri la sindikata movado ĉiu-lande!" *Bergische Arbeiterstimme:* Solingen, 20./21. 5. 26 (n-oj 115—116): "Naŭ jaroj sen Caro!" (kom-presservo). "Letero de laboristo el Sheffield pri la striko!" "Letero de rusa laboristo al la germ. laboristoj!" "Laborista Esp. letero el la Ĉekoslovakio!" *A Batalha:* Lisboa, 22. 5. 26: "Alvoko al revoluciaj Esp-istoj!" *Proletarij:* Ĥarkov, 12./16. 5. 26 (n-o 106/110): "Kio interesas anglajn laboristojn!" "Letero de Mancher'a SAT-ano al la Kremenĉug'aj!" "Letero de Alsmer'a SAT-ano al Kremenĉug'aj!" *Naŝ Putj:* Kremenĉug, 16. 5. 26 (n-o 110): "Letero de Rudolstadt'a SAT-ano al la fervojista esp. rondeto en Krjukov apud Kremenĉug!"

ATEISMO

Franca liberpensa organo — por Esperanto!

La organo de l' franciaj liberpensuloj "L' Idée Libre" (La Libera ideo) en sia maja n-o raportas pri la kontraŭesperanta atako de iuj monarkismemaj francaj katolikoj, proponantaj kiel internacian lingvon la latinan t.e. "la lingvon de l' katolikaj filozofio kaj teologio". Ĝi raportas pri tio, ke la organo de l' francaj monarkistoj "L' Action Française" malaprobas Esperanton kiel kreaĵon "juda kaj framasona".

Rilate al tio "La Libera Ideo" alvokas al subteno de la helpa mondlingvo. Ĝi diras: "Iuj katolikoj dezirus, efektive, malhelpi la disvolvon de l' internacia lingvo, ĉar ili estas partianoj de l' militoj kaj kontraŭuloj de l' frateca interproksimiĝo de l' popoloj.

Aliaj katolikoj, komprenante, ke estas maleble bari la vojon al progreso, penas forpreni Esperanton por ĝin servigi al malbona afero. **La antaŭenemaj partioj devas respondi al tiuj manovroj, propagandante la helplingvon per ĉiuj iliaj fortoj.** Ties disvastigeco, krom la praktigaj tujaj avantaĝoj, kiujn ĝi kunportas, helpos la homaranojn pli bone interkoniĝi super la mensogecaj limoj, starigitaj per la jezuitoj de ĉiu felkoloro." *V. Elsudo.*

Represigu en nacilingvaj gazetoj!

Ekspresa telegramo el regno de dio

(Sensacia revelacio)

El la alvoko de novelektita prezidanto pola nacio kun miro eksciis, ke en jaro 1920 bolŝevikojn el Polio forpelis ... "Sinjoro Dio".

Ĉu estus eble ekscii ĉe dia kortego el ĉielo, kial "Sinjoro Dio" ne helpis ĝis nun ortodoksulojn de rusa nacio kaj ne forpelis de Moskvo bolŝevikojn, ĉi-malkaŝajn malamikojn de "Dio", interfratiĝintaj kun "SAT-anoj"?

Esperante je bonvoleco kaj senprokrasteco de ĉiela kancelario, ni atendas tujan aŭ almenaŭ baldaŭan telegramon kun koncerna klarigo. Ne nur malhelpu la nigran kabineton de poŝtoficejo, kiu pasie ŝatas trarigardadi fremdajn korespondaĵojn. *Hohol.*

Centra Presejo Esperantista Paris

evtl. dungos du lertajn esperantistajn kompostistojn. Teknike nekapabluloj sin detenu! Skribu al: **V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris-Ve, Francio.**

Presejo: UNS-PRODUKTIV-GENOSSENSCHAFT, LEIPZIG